



VT 48 - APRILLO 2020

esperanto
Bretagne



la verda Triskelo

2 numéros par an, parution :
Printemps-Automne

Le 3 MAI
Assemblée Générale virtuelle
avec le service de téléconférence « Zoom »
En restant chez vous
(voir pages 2, 3 et 4)

Legu pri la
okazontaĵoj post la kvaranteno
Agenda au verso

Multaj vojaĝoj atendas vin
Al Ĉinio
Al Kartvelio
Al Rusio...
paĝoj 5 ĝis 14

Enhavo

- *Edito* p. 2
- *La Federacio* p. 3,4
- *Bicikle de Auray ĝis Kartvelio* p.5,6,7
- *Vojaĝo al Ĉinio* p. 8,9
- *Fransoaz' rakontas* p.10 ĝis 14
- *El niaj kluboj* p.15
- *Akelilo por multlingveco* p.16,17
- *Pasko* p.18
- *La trovita kato* p. 19
- *Agendo* p.20

Cotisation 2020

y avez-vous pensé ?

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif,
soutenez l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant
local si vous appartenez à un club, pour ad-
hérer à la fédération uniquement adressez-
vous à Xavier Godivier, *coordonnées p.2.*

Aux internautes

Site Internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org/>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio, et ainsi recevoir des nouvelles, plus
fraîches et plus nombreuses, envoyez un
message vide à l'adresse :

bretonio-subscribe@yahogroupes.fr

Redakcio : Jannick Huet-Schumann - 02.99.83.69.86 - huet.jannick@gmail.com - 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné
N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT
(par courrier ou par internet).

E D I T O

Tutmonde kunigitaj en nia izoleco

Nia nuna periodo estas multaspekte eksterordinara. Estas la unua fojo en historio de la homaro, ke la tuta mondo spertas samtempe saman situacion kiu atingas nin ĉiujn en nia ĉiu-taga vivo.

Tre strange tiu epidemio subite denove starigas la landlimojn kaj izoligas ĉiujn homojn... kaj samtempe tiu epidemio estas okazo por ĉiuj homoj alfronti samtempe la saman situacion: resti hejme, protekti sin, kaj havi la samajn zorgojn atendente pri la evoluo de la situacio.

Interreto en tiu periodo aspektas kiel stranga fenestro kiu ligas nin tute same, al proksimaj familianoj kaj amikoj kiujn ne plu eblas viziti, kaj al homoj de la alia flanko de la tero, kiuj spertas samtempe nian situacion.

Kiel esperantistoj, ni jam konas tion de longe! Sed espereble, post tiu travivaĵo ni estos pli nombraj tiel konscii pri nia komuna destino en nia malgranda komuna planedo.

Do atendente la liberiĝon de la epidemio, ni ĝoje tutmonde kuniĝu "virtuale" por prepari la estontajn pli varmajn brakumajn kunvenojn!

Xavier Godivier

Mondialement réunis dans notre isolement

Notre période actuelle est à bien des égards extraordinaire. C'est la première fois dans l'histoire de l'humanité que le monde entier vit en même temps la même situation qui nous atteint tous dans notre vie quotidienne.

Très étrangement, cette épidémie rétablit soudainement les frontières et isole tout le monde... Et en même temps cette épidémie est l'occasion pour tous de faire face à la même situation en même temps : rester chez soi, se protéger, et avoir les mêmes soucis en attendant que la situation évolue.

Internet dans cette période ressemble à une étrange fenêtre qui nous relie de la même manière, à la famille et aux amis proches qui ne peuvent plus être visités, et aux personnes de l'autre côté de la terre, qui vivent notre situation en même temps.

En tant qu'espérantistes, nous connaissons cela depuis longtemps ! Mais espérons qu'après cette épreuve nous serons plus nombreux à être conscients de notre destin commun sur notre petite planète commune.

Alors, en attendant la sortie de l'épidémie, réunissons-nous avec joie « virtuellement » pour préparer les futures rencontres plus chaleureuses !

Xavier Godivier (traduko al la franca de google translate)

Responsables des clubs (ou antennes) bretons

VT sendado	Manjo Clopeau	02.97.68.98.57	manjo.clopeau[ĉe]gmail.com
	12 rue de la Drisse 56450 Theix		
Armor-Esperanto (St Brieuc)	Alain Bournel	06.64.35.06.71	bournel.alain[ĉe]orange.fr
Hennebont	Yvette Veslin	02.97.36.08.75	yvette.veslin[ĉe]orange.fr
Lorient	Anne Georget	02.97.64.30.39	anne.georget[ĉe]wanadoo.fr
Plouézec	Jeanne Pouhaër	09 62 30 40 05	jeanne.pouhaer[ĉe]orange.fr
Lannion	Françoise Cornuejols	02.96.45.30.60	meriaux.family[ĉe]yahoo.fr
Guingamp	Anne Desormeaux	02.96.35.83.25	anne_desormeaux[ĉe]yahoo.fr
Saint Quay Perros	Nicole Rizzoni	02.98.88.62.57	nicole.rizzoni[ĉe]wanadoo.fr
Vannes	Elisabeth Le Dru	06.21.07.11.09	ledruelisabeth[ĉe]gmail.com
Rhuys	Francis Desmares	02.97.26.89.96	sicnarf56[ĉe]free.fr
Pontivy	Marielle Giraud	02.97.27.76.98	liber.terre[ĉe]wanadoo.fr
Rennes	Xavier Godivier	09.53.17.02.55	zav[ĉe]esperanto-panorama.net
St Malo	A-Marie Argney	02.99.40.24.86	amargney[ĉe]wanadoo.fr
Pleudaniel	Pierre Cardona	02.96.30.23.94	kortep[ĉe]gmail.com
Plestin les Grèves	Hélène Dubois	02.96.35.73.06	marbordo22[ĉe]yahoo.fr
Dinan-Ploubalay	Philippe Stride	06.76.29.90.11	philippe.stride[ĉe]gmail.com
Montfort-sur-Meu	Josette Duclouy	02.99.09.71.92	jpduclouy[ĉe]club-internet.fr
Querrien	Françoise Noireau	06 09 12 03 74	desirdapprendre@gmail.com
Herbignac	J-Y Santerre Duret	02.40.88.96.98	jys.mys[ĉe]club-internet.fr
Saint Aignan de Grand lieu	Solange Goan	02.40.31.02.56	sgoan[ĉe]club-internet.fr
Nantes	Lucette Echappé	02.40.04.46.02	lucette.lumeto[ĉe]laposte.net
St Nazaire	Chantal Barret	02.40.01.97.27	patchdomo[ĉe]yahoo.fr

F e d e r a c i o

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE virtuelle DU DIMANCHE 3 MAI 2020

ordre du jour:

10h00 Accueil vidéo-conférence

10h –12h mot du président , approbation des rapports d'activité et financier 2019, **élection tiers sortant du CA**

Proposition achat part sociale MCE/Grésillon

**Présentation du système de la cotisation groupée avec
Espéranto-France**

Prochaines tournées, projets

14h- 16h Tour des clubs, Hommage à Gaby, livre sur la vie de Gaby, les outils internet pour les réunions virtuelles

Agadraporto 2019 (por la federacio)

Lokaj grupoj

Côtes d'Armor : Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Peumerit-Quintin, Lannion, Guingamp, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec.

• **Finistère** : Douarnenez, Landerneau, Querrien.

• **Ille-et-Vilaine** : Rennes, Montfort, St Malo

• **Morbihan** : Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient. Pluvigner

• **Loire-Atlantique** (kunlaboro kun la lokaj kluboj): Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu.

Membraro

.154 membroj ĉi jare do 1 malpli ol dum la antaŭa jaro.

Federaciaj agadoj

Eldono de la federacia bulteno *Verda Triskelo*

20-paĝa, 2 foje jare aŭtune kaj printempe, kun artikoloj proponitaj de la membroj de la diversaj lokaj kluboj, redaktoro: Jannick Huet.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/> :

administrantoj: Bert Schumann kaj Xavier Godivier.

Reta diskutlisto de la membroj:

bretonio@yahoogroups.fr :

kun 280 abonantoj, pli ol 200 mesaĝoj ene de 2019, administrata de kvar volontuloj.

Organizo de prelegturneoj

Du ĉefaj turneoj okazis dum 2019 en Bretonio, Ĉielismo el Ĉinio en marto kaj Rainer Kurz en majo :

Ĉielismo, el Xi'an (Ĉinio), invitita de la FEB, rondvojaĝis tra Bretonio de la 9^a de marto ĝis la 9^a de aprilo 2019. Li vizitis 15 klubojn kaj sukcese prelegis pri diversaj temoj.

Pri sia sperto en uzo de Esperanto kiel komercisto li prelegis en la Komerca kaj Industria Ĉambro en Rennes kaj renkontis oficiston de tiu Ĉambro en St Brieuc. Pri ĉina historio kaj kulturo li prelegis en municipa biblioteko en St Malo, en Vannes, St Nazaire... Pri sia urbo Xi'an li prelegis en Pluezek, Lannion, Douarnenez... En kaj ĉirkaŭ Nantes, li prelegis pri la tri temoj, li estis invitita de Télé-Nantes kun Bruno kaj Maryvonne Robineau por intervjuo kaj eĉ partoprenis vino-logian kunvenon.

Li renkontis liceanojn en St Brieuc, partoprenis lingvan kafejon en Douarnenez, vizitis esperanto-klasojn, klubanojn, ĝuis turismajn lokojn kaj eĉ ekinoksan tajdon.

Fine de sia turneo okazis en St Aignan-de-Grandlieu tagmanĝo kun impona grupo de esperantistoj el la tuta regiono, kiuj kantis, akompanataj de la gitaro de Luc, kaj aŭskultis ĉinajn kantojn bele interpretitajn de Ĉielismo.

Rainer Kurz rondvojaĝis tra Bretonio de la 12-a ĝis la 25-a de majo en Rennes, St Malo, Pleudaniel, Douarnenez, Couëron kiel detale raportita en antaŭa Verda Triskelo VT47.

Rilatoj kun Esperanto-France

Josette Ducloyer reprezentis la FEB-on ĉe UFE, du aliaj membroj de la federacio estas ankaŭ UFE-komitatoj kiel reprezentantoj de membroj de UFE.

Jara kunveno en Loudéac la 24an de marto 2019
19 ĉeestantoj, 16 membroj + 14 prokuroj,

Fine de la mateno, okazis Skype Kunveno kun Isabelle, Damien kaj Zsofia en Hungario. Isabelle, Damien kaj sia filino Auriane foriris el Bretonio bicikle kaj alvenis en Hungario kie ili restis dum la vintro.

Posttagmeze la Ĉino Ĉielismo prelegis pri la ĉina kulturo.

Agoj de la lokaj asocioj membroj de la federacio :

Kursoj de Esperanto : Kursoj kaj konversaciaj rondoj estas proponitaj en 15 urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Detaloj pri ĉiuj kursoj estas ĉiu-jare disdonitaj en la aŭtuna revuo de la federacio, Verda triskelo, VT47 por ĉi-jare, konsultebla en la ttt-ejo de la FEB.

Pli detala raporto pri la lokaj asocioj estos prezentita okaze de la membrokunveno de la federacio kaj konsultebla en la TTT-ejo de la federacio.

F e d e r a c i o (s e k v o)

Rapport financier exercice 2019

Débits

	2019	2018
6063 valise audiovisuelle	29,99 €	0
613 locations	265,40 €	258,28 €
616 assurance	61,48 €	61,48 €
6237 edition	324,73 €	320,72 €
625 tournées	1019,35 €	219,60 €
6251 frais déplacements	113,75 €	78,65 €
626 frais d'affranchissement	0,00 €	74,16 €
6571 examens et stages	35,00 €	167,50 €
66 frais bancaires	0,00 €	8,10€
Total	1 849,70 €	1 188,49 €

Crédits

	2019	2018
707 vente de livres	10,00 €	0
756 cotisations	1 087,00 €	1 777,80 €
7561 participations tournées ext. bretagne	60,00 €	0
7585 Dons reçus	0,00 €	77,10 €
758 Revenu d'intérêts livret CMB	37,00 €	36,72 €
Total	1 194,00 €	1 891,62 €

Compte de résultat

Produits 2018 à recevoir en 2019 de Eo France	0,00 €
Charges 2018 payées en 2019	140,40 €

	2019	2018
Dépenses	1 849,70 €	1 188,49 €
Recettes	1 194,00 €	1 891,62 €
Excédent / Déficit	- 655,70 €	+ 703,13 €

2019 2018

Solde compte chèque	354,24 €	1 065,58 €
Solde livret bleu	4 969,81 €	4 932,81 €
Solde caisse	0	0
Total	5 324,05 €	5 998,39 €

Bicikle de Auray ĝis Kartvelio

Biciklado tra la mondo de Izabel kaj Damien

En majo 2018, Izabel, Damien kaj ilia filino Auriane (18 monataĝa) forlasis Bretonion por longega vojaĝo per biciklo. Okaze de ilia restado en Bretonio dum la pasintaj jarfinaj festoj, Amapola kaj mi vizitis ilin en la Insulo de la Monaĥoj (Ile aux Moines) ĉe amikino de ili. Mi profitis de tiu renkonto por intervjui Izabel pri ilia vojaĝo.

La ekiro el Auray



Lorento : Unue, bonvolu memorigi al ni la ĉefajn celojn de via vojaĝo.

Izabel : La fina celo estas viziti mian fraton Guillaume kiu loĝas en Aŭstralio. Ni deziras ankaŭ doni al nia bebo Auriane tre belan sperton de vivo meze de la naturo. Alia grava celo estas malkovri diversajn homojn tra la mondo.

Ĉar ni deziras ankaŭ viziti geamikojn dum la vojaĝo, ni planis la vojiron laŭ la lokoj kie ili loĝas. Unue, ni iris al Aŭstrio viziti amikinojn. Poste, ni planas viziti alian karan amikinojn Tatiana en Uzbekio. Poste ni planas trairi Kirgizion kaj Ĉinion, ĉar ni volas eviti la alian vojon (tra Pakistano kaj Barato) kiu trairas Afganion. Jen la gravaj etapoj de nia vojaĝo.

L. Bonvolu menciigi kiujn landojn vi jam travojaĝis.

I. Ni trairis Francion, Germanion, Aŭstrion, Slovakion kaj en septembro 2018, atingis Budapeŝton en Hungario. Ĉar ni elektis vivi sen mono, sen petrolo kaj sen elektro, ni veturas nur per biciklo kaj plej ofte tendumas. Por trapasi la malvarman periodon en favoraj kondiĉoj, ni restadis en Budapeŝto de septembro 2018 ĝis majo 2019.



L.

Kiel vi vivis dum aŭtuno kaj vintro en Budapeŝto?

I. Ni interŝanĝis laboron kontraŭ loĝejo kaj manĝoj kadre de « woofing » sistemo (Worldwide Opportunities en Organic Farms : mondvastaj oportunoj en mediprotektaj farmbienoj).

L. Kaj post Budapeŝto ?

I. Post Hungario, ni traveturis Serbion, Rumanion kaj iomete Bulgarijon ĉar fakte ni sekvis la longan riveregon Danubo kiu iras de Germanio ĝis Nigra Maro.

L. Tio signifas, ke vi elektis iri kiel eble plej ofte laŭlonge de riveroj, ĉu ne ?

I. Jes ni uzis la faman eŭropan biciklan vojon 6 kiu ligas Atlantikon al Nigra Maro laŭirante Luaron, Rejnjon kaj fine Danubon. Estas belega kaj ofte facila vojo des pli taŭga, ke Damien kaj mi tiras ĉaretojn portante Auriane-n kaj pakajojn.

L. Kaj finfine kiun lokon vi atingis ?

I. En septembro 2019 ni alvenis al Kartvelio kie ni restadas per « woofing » sistemo dum la malvarmaj monatoj. Sed nuntempe ni estas en Francio por viziti familianojn kaj geamikojn dum kelkaj semajnoj.

L. Ĉu vi bonvolas klarigi kiel vi elturniĝas por vojaĝi sen mono ?

I. De pli ol 5 jaroj, ni vivas preskaŭ sen mono, sen petrolo kaj sen elektro. Ni uzas la saman manieron kiel en « woofing » kiu konsistas el interŝanĝo de laboro kontraŭ nutraĵo kaj tranoktejo. Konkrete, tio signifas, ke survoje ni proponas ekzemple al panvendistoj nian helpon kontraŭ pano eĉ de la antaŭa tago.

Bicikle de Auray ĝis Kartvelio

L. Ĉu tiu sistemo ĉiam bone funkciiis dum via vojaĝo ?

I. En Francio, ni jam spertis ĝin kaj ĝi sufiĉe bone funkciiis : duono de la personoj konsentas, duono rifuzas. En Germanio ĝi malpli bone funkciiis : triono de la personoj akceptas la sistemon. Sed en kelkaj landoj, la personoj donas al ni nutraĵon sed rifuzas nian helpon pro diversaj kialoj : kelkfoje ili ne scias kiel klarigi al ni la taskojn, sed plej ofte ili tiom miras pri nia vojaĝo kun bebo, ke ili deziras helpi nin sen kompensado.

Ankaŭ en kelkaj landoj (Serbio, Rumanio kaj Kartvelio) pro ilia kulturo, la homoj estas tre helpemaj kun la vo-



jaĝantoj. En tiuj landoj, ni eĉ ne bezonis peti nutraĵon ; loĝantoj memvole venis al ni por donaci fruktojn kaj legomojn el ilia ĝardeno.

L. Kiel vi komprenigas vian vojaĝmanieron en landoj kies lingvojn vi ne parolas ?

I. Ĝenerale ni povas uzi nek Esperanton nek la anglan ĉar ni ĉefe veturas en la kamparo kaj renkontas maljunulojn. Do mi kreis ilon : mi realigis libretojn per A4 formataj paĝoj kiujn mi faldis por akiri okpaĝajn libretojn. En ĉiu paĝeto, mi klarigis nian vojaĝon kaj vojaĝmanieron per fotoj kaj kelkaj esperantaj vortoj.

L. Ĉu la bildoj sufiĉas por ke aliuloj komprenu vin ?

-I. : Jes.

L. Kion implicas vojaĝo kun bebo?

I. Ni devas tre ofte purigi la tukojn kaj vestaĵojn. Por tio necesas multe da tempo des pli ke ni decidis uzi kotonajn pistukojn por Auriane.

Ni devas ankaŭ esti paciencaj por respekti ŝian ritmon. Ekzemple ni devas ofte halti laŭ ŝiaj bezonoj por ludi, paŝi ktp. Sed la tre agrabla aspekto estas, ke ni vivas meze de la naturo. Damien faris etan seĝon el bambuo kiun li instalis je la antaŭa parto de mia biciklo : tiel Auriane povas sidiĝi en ĝi kaj observi , kanti, ludi. Kiam ŝi laciĝas, ŝi diras « Mi bezonas dormi », tiam ni haltas kaj kuŝigas ŝin en la ĉareton.

L. Kiom da kilometroj vi averaĝe biciklas tage ?

I. Ni bicikladas pli malpli 40 km tage.

L. Kiel vi faras kiam pluvas ?

I. Ni observas la nubojn kaj kiam ni antaŭvidas pluvon, ni serĉas ŝirmejon. Sed tio ne ĉiam eblas, des pli ke niaj veturiloj estas longaj pro la ĉaretoj. Do efektive kelkfoje, fakte malofte, ni bicikladis sub pluvo. En Bratislavo (ĉefurbo de Slovakio) ni bicikladis sub ege daŭra kaj forta pluvo. Feliĉe, per Pasporta Servo, ni povis gastigi (kaj sekigi la aferojn) ĉe tre afabla esperantistino, Mariana.

L. Do mi deziras paroli iom pri Esperanto. Kiel vi uzis la lingvon dum via vojaĝo ?

I. Antaŭ la foriro, ni provis kontakti esperantistojn per Pasporta Servo. En Francio ni renkontis plurajn esperantistojn en urboj (Nantes, Besançon ktp). Sed survoje estis pli kaj pli malfacile renkonti esperantistojn ĉar ni ne havas interreton kaj ni veturas ĉefe en la kamparo. Tamen en Budapeŝto kie ni restadis dum pluraj semajnoj, ni renkontis esperantistojn kaj gastis ĉe kelkaj el ili. Estis tre plezuraj renkontoj. Ankaŭ en Budapeŝto, iu virino, vidante nian esperantan flagon, alparolis nin esperante. Tiaj hazardaj renkontoj kun esperantistoj okazis plurfoje ekzemple ankaŭ en Kartvelio, sed ĉefe en grandaj kaj mezgrandaj urboj. .

Bicikle de Auray ĝis Kartvelio

L. Krom pluvo, kiujn aliajn malfacilaĵojn vi renkontis dum la vojaĝo?

I. Ĉar Damien estas tre manlaborema, li kapablas ripari ĉiujn bicikloproblemojn. Tamen ni renkontis alian gravan malfacilaĵon. En septembro 2018, post kelkaj monatoj, ni ege deziris revidi familianojn kaj geamikojn. Do kvankam de 7 jaroj, pro naturprotektadaj motivoj, ni ne plu uzis aviadilon, trajnon, aŭton...

L. : Ĉu vi vere vojaĝis nek per trajno nek per aŭto de 7 jaroj ?

I. Fakte nur kelkfoje kaj por mallongaj vojiroj, ni veturis per aŭto aŭ trajno. Sed laŭ ekologia vidpunkto, flugo por ni tri pli taŭgas ol flugo por niaj 7 familianoj (niaj gepatroj kaj la gefiloj de Damien). Do ni finfine decidis reveni al Francio dum kelkaj semajnoj okaze de la Kristnaskferioj. Tamen uzi aviadilon ege malplaĉas al ni. Estas grava dilemo.

L. Kiuj momentoj estas la plej belaj, la plej agrablaj dum la vojaĝo?

I. Ni renkontas multajn mallongajn feliĉajn momentojn en nia ĉiutaga vivo kun Auriane. Ni povas bani en la riveroj ofte, ni ankaŭ ofte manĝas fruktojn rikoltitajn survoje, kaj al mi pli gravas la malkovro de mirindaj pejzaĝoj kaj ĉarmaj lokoj meze de la naturo.

Ekzemple iam laŭ Danubo ni spektis ian alcedovilaĝon : estis magia momento



L. Kiujn laborojn vi faris en Budapeŝto kaj nun faras en Kartvelio kontraŭ loĝejo kaj nutraĵo?

I. En Hungario ni laboris en du malsamaj farmbienoj. En unu el ili, tre izolita, sen komuna elektro, sen akvo je

krano, necesis varmigi kaj kuiri per ligno. Do tie ni ĉiutage tranĉis kaj transportis la ŝtupojn, purigis la fajrujojn. Tiu vivmaniero tre taŭgis kun niaj ekologiaj valoroj. Dum nia restado okazis ankaŭ multaj naskoj de ŝafidoj kiujn Auriane povis karesi kaj ankaŭ ludi kun ili: por ŝi estis magie. Ŝi multe lernis pri la bestoj, la naturo ktp.

L. Kaj en Kartvelio, kion vi faras ?

I. Kutime ni povas purigi, ripari, zorgi pri la mastrumado de la lokoj, pri la bestoj ktp. En Kartvelio, ni restadas en « Steiner Waldorf » lernejo kie ni partoprenas en tiuj taskoj. Plie, kvankam mi ne parolas la kartvelan lingvon, mi sukcesis iom profitigi la plenkreskulojn de miaj konoj pri pedagogio kun infanoj. Auriane nun vizitas la kurson por infanetoj.

L. Ĉu Auriane bone adaptiĝis en la lernejo ? Ĉu ŝi sukcesas havi rilatojn kun la aliaj infanoj ?

I. Ŝi kutimas renkonti infanojn do ŝi ne timas renkonti la aliajn sed je tiu aĝo, ofte infanoj ne kutimas ludi kun aliaj infanoj. Tiel Auriane ofte restas sola. Tio kompreneble frustras min.

L. Ni interŝanĝis pri diversaj aspektoj de via vojaĝo. Ĉu vi deziras aldoni pri iu grava aspekto?

I. Kvankam ni ne havas poŝtelefonon kun interreto, jen retejo per kiu eblas sekvi nian vojaĝon : auraysidneyavelo.ouvaton.org. Sed estas tre malfacile al ni ĝisdatigi ĝin.

L. Dankon Izabel kaj bonan pluvojaĝon.

Lorento

Jen la lasta mesaĝo (23an de marto) kiun ni ricevis de Izabel : ŝajnas ke ĉio glatas !

Karaj Lorento kaj Amapola,

Dankegon pro via mesaĝo ! Ni bonege fartas, en kamparo en Kartvelio en WWOOFing.


Ni ŝategas pluesti ĉi tie kun familio kiel nia. Kaj ili ankaŭ bezonas nin ; do, ni ne timas pro estonteco por ni mem, pro venonta estonteco.

Kaj vi, kiel vi fartas ? Bonvolu brakumi kaj kisi la aliajn esperantistojn !

Iza Da kaj Ori

Viziti Ĉinion dank'al Esperanto (parton de!)

Unu monato en Ĉinio per Esperanto



De mezo de oktobro 2019, (ĵus antaŭ la komenco de la kronvira pandemio!), mia edzo Petro kaj mi vojaĝis unu monaton en Ĉinio de Pekino al Ŝanhajo.

En ĉiu el niaj 9 etapoj ni estis varme kaj zorge akceptitaj de lokaj esperantistaj ĉinoj. Ni revenis kun belaj bildoj en la okuloj, granda miro pro la tute fremda kulturo ... kaj forta emo al manĝo de pano!

Ni retrovis konatajn amikojn, kiuj jam rondiris en Bretonio : Ĉielismo en Xi'an Trigo en Wuhan kaj Sanoza el Nanchang, kaj konatiĝis kun multaj aliaj interesaj kaj helpemaj esperantistoj.

Ni vizitis historiajn grandegajn urbojn kaj nacian parkegon.

- ◆ La nuna ĉefurbo Pekino. Ĝi ne estas tiom poluada kiom oni ofte aŭdas (la nuntempaj motorbicikloj estas elektraĵoj). Belegaj temploj, parkoj en kiuj multaj ĉinoj promenas, gimnastikas, ludas kaj dancas, la Granda Murego 60 kilometrojn norde de la urbo ...
- ◆ Taiyuan, moderna urbejo. Tie ni gastis en elementa esperantista lernejo *Baiyangshujie*, kie mi instruis. Interesa deinterna sperto de vivo en ĉina lernejo!
- ◆ La historia cefurbo Xi'an, kie Ĉielismo montris sian laborejon. Krom la mondfama enterigita armeo, ni vidis imponan remparon, islaman kvartalon (Siano estis siatempe ekirpunkto de la silkvojo) kaj belege aranĝitajn kaj nokte lumigitajn avenuojn ...
- ◆ Wuhan, kie Trigo akceptis nin en sia hejmo. Ni malkovris la ludon Mah-jong, kiu furoras en Ĉinio, ĉelagajn lotusajn areojn, admirindajn florajn artaĵojn en la parkoj, eksterordinarajn noktajn videojn sur la domegaj fasadoj, teceremonion, kaligrafion ... Ni partoprenis kun trideko da ĉinaj esperantistoj en *EMO*, triprovinca kunveno en najbara montaro apud budhista templo.
- ◆ Chenzhou. Tie ni ekskursis al monto, kie inter taoisma templo kaj budhista templo la loka societo sukcesis starigi surrokajn pentraĵojn honore al Esperanto.



- ◆ Zhang Jia Jie, admirinda nacia parko, kie estis filmita en 2009 la fama *Avatar* de la usonano *James Cameron*. Tie gvidis nin Sanoza, kiun pluraj el vi konas pro ŝia ĉeesto en Pluezek, kaj amikino ŝia. Ni laŭiris belegajn pejzaĝojn, surgrimpis multajn ŝtupojn, paŝis sur vitraj padoj pendantaj ĉe klifoflankoj. Imprese sed sendanĝere! Ni vizitis tradician vilaĝon, kie agadas homoj laŭ antaŭaj vivmanieroj kaj ĝuis belegajn spektaklojn kun kostumoj, dancoj kaj antikvaj muzikiloj kiel sonorilaroj kaj kordinstrumento *Guzheng*.
- ◆ Changsha, naskiĝurbo de Mao. Belegaj modernaj muzeoj.

Viziti Ĉinion dank'al Esperanto

- ◆ Hangzhou. Parkoj, lagoj, muzeoj. Promenado sur la komenco de la Granda Kanalo, antikva akvovojo al Pekino, kiu laŭiras malnovan kvartalon de silkistoj. Ni malkovris ankaŭ la medicinan kvartalon, kie en grandaj lignaj domoj laboras tradiciaj kuracistoj kaj apotekistoj.
- ◆ Shanghai, fino de nia vojaĝo. Grandega moderna urbego kun tamen tradicia antikva kvartalo.



Kelkaj rimarkindaĵoj en Ĉinio :

Rilate al manĝoj ni spertiĝis pri uzo de manĝbastonetoj, malkovris bongustegajn supojn, legomojn, pastaĵojn ... sed ankaŭ ŝokiĝis pri (por ni) aĉaj manĝmanieroj, kiel brua engluto, ruktado aŭ elĵeto surtablen de ĉiaj rubaĵoj. Fine de monato, plej mankis al ni pano, fromaĝo ... kaj vino!

Estas ja konata fakto, ke ĉinoj estas multnombraj. Ĉie ĉiam oni konscias pri tio, surstrate, en stacidomoj, trajnoj, vizitlokoj, restoracioj, lernoklasoj.

Mi instruis en diversaj medioj :

En elementaj lernejoj de Taiyuan kaj Chenzhou kaj en gimnazio de Chenzhou al klasoj de 50 ĝis 150 lernantoj, kie infanoj estis atentemaj, scivolemaj, amindaj ... sed malfacilas unuopigi instruadon al tiom da samtempaj homoj! Instruistoj de Esperanto montris intereson al miaj modernaj paroligaj metodoj.

Mi instruis al plenkreskuloj en lernejo por libera tempo kaj en la montara aranĝo apud Wuhan. Mi ankaŭ prelegis en pekina lingva universitato.

Diri, ke ni pasigis memorindan monaton tra Ĉinio estas sub la vero. La sperto estis riĉa, rilate al turismo, kulturo kaj malkovro de tute fremda pensmaniero, same kiel rilate al varma akcepto, amikeco kaj interŝanĝoj kun lokaj esperantistoj. Plian fojon nia internacia lingvo montriĝis altvalora por starigi ponton inter popoloj!



Elinjo

Fransoaz' rakontas

Raporto pri la Kerjena Esperanto-Klubo (29310 Querrien, inter Ar Faüedo/Le Faouët kaj Kemperleo/Quimperlé.)

NIA KLUBO ESPERANTO KERJENO

En Kerjeno estas klubo de komencantoj kun diversaj aĝoj, niveloj kaj interesoj. La klubo naskiĝis en Majo 2018, tuj post la dutaga ekspozicio en Kerjeno, kie multaj el vi prelegis!

Iuj el miaj kvar gelernantoj tute ne deziras formalan kurson sed ĉiuj aĉetis la lernolibron de Espéranto France "Méthode 11". De post mia Lingvo-Festivalo (14/02/2020) alvenis du pli junaj veraj komencantoj.



Ni ludas kartojn, rolludas, havas ĉiam diversajn projektojn, ekz. partopreni en deklamkonkurso aŭ traduki tutan infanabul-tenon por sendi al Jekaterinburgo (ĝi neniam alvenis, ĝi mala-peris survoje...) Estis ilia ideo, nu... Feliĉe ni poste sendis bit-kopion!

Ni videotelefonas per la mesaĝilo de Fejsbuko kaj per Vaca-po al miaj diversaj kontaktoj en la mondo, kiuj volonte paroligas miajn komencantojn.

Miaj kursanoj regule kunvenadas eĉ kiam mi forestas en vojaĝo.

Ĉar mi nepre alvokas ilin de ie ajn, kie mi estas, por konatigi ilin kun eksterlandaj esperantistoj, geamikoj, gastigantoj, gelernantoj k.a.



INSTRUADO EN RUSUJO

En 2019 mi ĝuste forestis en januaro kaj Februaro ĉar mi instruis Esperanton en Rusujo.

En Moskvo mi muzikis por E-renkontiĝo ĉe Dima kaj Anna, poste en Ŝumerlja ĉe Andrej kaj Nataŝa. Tie okazis televida elsendo pri mia vizito al lernejo por handikapitaj infanoj kaj al lernejo por junaj infanoj, kaj alia televida elsendo por la finjaraj festoj, kie mi violonis "Petit Papa Noël" (Eta Julpaĉjo) en ruĝa robo, kiel decas!

Poste mi veturis al Mariujo, la Maria Respubliko. Tie mi instruis 1 semajnon en prilingva feriejo en la arbaro. Komence mi prelegis por ĉiuj (inkluzive por diversaj volontuloj el diversaj landoj) kaj sekve mi instruis ĉiun posttagmezon al infanoj kaj adoleskantoj. Tie mi prezentis ankaŭ kelkajn distraĵojn per mia violono, mi instruis popoldancojn kaj prezentis mian spektaklon de klaŭno violonisto kun marioneto klaŭneto violonisto.

En januaro kaj februaro mi regule instruadis en privata lingvolernejo en Ĉeboksaro, ĉefurbo de Ĉuvaŝujo.



Mi estis volontulo akceptata de Aleksandr Blinov, la direktoro, kiu ankaŭ estas profesoro de lingvistiko tie.

En la urbo mi ĝuis sendependan apartamenton kaj memstare vivis kaj veturis per publikaj transportiloj al mia laborejo.

Estis diversaj kursoj en la privata belega lingvolernejo sed ankaŭ en la nacia ĉuvaŝa biblioteko.

Tie rusino, kiu klopodis konvinki min por instrui la francan plendis: "en tiu urbo estas pli da Esperantistoj ol da francparolantoj!"

Okazis diversaj aranĝoj, kie mi instruis bretonajn kaj francajn popoldancojn, kaj montris apojn por poŝtelefono por esperantistoj.

Fransoaz' rakontas



Por la plenkreskaj komencantoj estis 3 lecionoj semajne, pagendaj al la lingvolernejo.

La grupo de infanoj estis la plej multnombra, ĉ. 15, temis ĉefe pri infanoj de la lokaj esperantistoj kaj ni bone kantis, ludis, dancis kaj videotelefonis kun aliaj infanoj en la mondo.

Memstare mi ankaŭ partoprenis en diversaj rondoj kaj renkontis diversajn homojn, ekzemple en kunveno de vojaĝantoj de Couchsurfing (reto por vojaĝantoj, por gastis aŭ gastigi.) Mi komencis paroli ruse sed post mallonga tempo rezignis kaj paroladis nur angle, kun bela surprizo: en la publiko estis 2 esperantistoj! Ili petis min violoni kaj vere Esperanto montriĝis al ĉiuj kiel mojosa lingvo!

En la granda nacia ĉuvaŝa biblioteko mi ankaŭ gvidis ĉiusemajnan babilrondon en la franca, tie mi diskonigis Esperanton kaj memstare kontaktis instruistojn de la angla. Mi veturadis al diversaj partoj de la ĉefurbo por prelegi en la angla en klasoj de gimnazio, altlernejo, informadika lernejo k.s., prezentis min, respondis iliajn demandojn kaj informis pri Esperanto kaj la privata lingvolernejo kie eblas ĝin lerni en Ĉeboksaro.

Foje mi escepte eniris (elpaŝis, kiel diras la rusoj) en diversajn lernejojn, en muziklernejojn kaj en grandan altlernejon por instrui popoldancojn per Esperanto, dank' al Aleksandr Blinov, la organizanto kaj interpretisto. El tio rezultis kelkaj televidelsendoj kaj radioelsendoj. Bone estas kompreneti la rusan por mense rapide prepariĝi al la demandoj, en rekta elsendo, antaŭ ol la interpretisto tradukas: "Ĉu vi, esti el Francio, ĉu vi vere manĝas ranojn?".

Ĉeboksaro estas la plej esperantista urbo en Rusujo sed la movado dormetas tie. Tamen, surstrate homoj plej ofte scias kio estas Esperanto kiam mi diras: "Я преподаю эсперанто в языковой школе. Я учитель языка эсперанто." (O ve, jam mi ĉion forgesis!)

Mi ankaŭ revizitis geamikojn de la klubo de Kazano, ĉefurbo de Tatarstano, kaj tio donis al mi la ideon lanĉi poliglota renkontiĝon ankaŭ ĉe mi, en Bretonujo

BISTROT POLYGLOTTE EN KERJENO (QUERRIEN)

Do, ĉiun duan Mardon en la kafejo de mia vilaĝo Kerjeno/Querrien, ekde mia reveno hejmen, jam fine de februaro 2019 okazas poliglota renkontiĝo. Tiam mi decidis ĝemeli-



gi tiun eventon kun **"Duolingo Event"**, kies "ambasadoro" mi fariĝis. Sed neniu lernas per Duolingo, ĉar la distanco por averti lernantojn tro mallongas por malmulte loĝata kamparo, ĝi taŭgas nur por urbejoj. La **"Bistrot Polyglotte"** daŭre okazis ĝis la kvaranteno, kaj estiĝis helpo por organizi Lingvo-Festivalon.

Jes! Ĉar en Ĉeboksaro Aleksandr Blinov instigis min organizi lingvan festivalon! Jes, ja, en mia vilaĝo, en Bretonujo kiam mi revenos hejmen!

Printempe, Ĉielismo invitis min por instrui muzikon en Esperanto en la lernejo de S-ro Jado dum 6 monatoj. Mi hezitis sed kontaktis S-ron Wei Yubin, Jado.



Fransoaz' rakontas

LA BET 55 EN LITOVUJO

En Julio mi denove forvojaĝis. Mi partoprenis en la 55a BET (Baltiaj Esperanto Tagoj) en Panevė-žys. Unue mi restadis en Riga, en Latvujo, kaj konatiĝis kun diversaj lokaj esperantistoj.

Poste en la BET ĉiun matenon mi instruis la nivelon B2 kaj ĉiuvespere mi violonis por unu el miaj muzikaj programeroj. Aparte menciinda estas mia solista koncerto "Violono de la Mondo", kie mi prezentis 55 popolmuzikojn el 55 landoj, okaze de la 55a BET kaj mia 55-jariĝo.

Tie S-rino Arko denove kontaktigis min kun S-ro

Jado kaj li akceptis ke la volontulado daŭru nur 3 monatojn. Sed mi daŭre hezitis.



Eventoj

"Malgranda UK" en Litovio.

Grandaj kaj internaciaj 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

SOMERA AGADO EN GREZILJONO

Aŭguste mi restadis 10 tagojn en Greziljono ĉefe por muziki sed ankaŭ por instrui (violonon kaj Esperanton al adoleskantoj), gvidi botanikajn promenadojn, instrui popoldancojn, akompani kantadon de francaj kanzonoj per mia violono, kaj prezenti vesperajn perviolonajn distraĵojn

nteralie mi prezentis Esperantajn apojn (aplikaĵojn por poŝtelefono), ne nur Amikumu aŭ PReVo, kaj mi ankaŭ helpis al instalado de klavaro, liberigo de memorspaco, alŝuto de portreto kaj redakto de sinprezento.

Tie mi ĉiun matenon ĝuis la plezuron matenmanĝi kun Dennis Keefe, la iniciatinto de la Festivaloj pri lingvoj. Li estas merkatikisto kaj elpensis tiun eventon kiel la plej bonan ilon por diskonigi Esperanton. La ideo lanĉi Lingvo-Festivalon en mia vilaĝeto en la kampa-ro progresis en mia kapo.

AŬTUNA AGADO EN GREZILJONO

Aŭtune denove en Greziljono. Violonkursoj en Esperanto, lecionoj al adoleksantoj per tabloludoj, promena-

doj en la parko por nomi la plantojn, posttagmezaj babilrondoj pri edukado en Esperanto kaj denaskismo, diagnozo de aŭtismo (Aspergersindromo), kaj alies tre interesaj vesperaj programoj. Tie mi ankaŭ montris mian prezentaĵon pri vojaĝo en Rusujo tra 8 urboj, en la aŭtuno de 2018, per bildoj kaj filmetoj. Mi prezentis denove kun Oktavo, juna knabo flua en Esperanto kaj violonisto, mian klaŭnospektaklon.

Mi lanĉis novan distraĵon: amfabelon dulingvan (Esperanto-franca) kun muzikaj ilustraĵoj per violono.

Tie mi ofte rilatis kun François Lo Jacomo kaj mi parolis pri mia projekto de Lingvo-Festivalo.



Fransoaz' rakontas

PROJEKTO DE LINGVO-FESTIVALO

Aŭtune mi lanĉis mian projekton de Lingvo-Festivalo, festivalo pri denaskaj lingvoj, sub la aŭspicioj de UNESKO (la internacia tago de denaskaj lingvoj okazas en februaro.)

Elekti internacian daton malfermas la pordon de amaskomunikiloj, jen en Tébéo - TébéSud.

Trafa estis ankaŭ la dato (ĵus antaŭ la ferioj, por venigi klasojn) kaj estis sennombraj artikoloj en diversaj gazetoj de la 2 departementoj 29 (Finistère) kaj 56 (Morbihan).

Denove dankon al Armor Esperanto, kiu de 2 jaroj disponigas al mi siajn 6 grandajn plastajn afiŝojn, tiel ke estis informoj pri Esperanto kelkajn semajnojn antaŭe en la biblioteko kaj en la tago mem en la enirejo de la kulturdomo, kie okazis la festivalo.

La projekto ne interesis miajn kursanojn, do mi sola esploradis dum monatoj por serĉi kaj trovi parolantojn de diversaj lingvoj. Tio estis la plej interesa parto de la laboro.

Pri reklamado: Mi disdonis afiŝojn, vizitis lernejojn, veturis al diversaj intervjuoj. Okazis unu televida elsendo (en Brest), rekta radio elsendo en Quimper (Radio Bleu Breizh Izel), kaj 2 aliaj radioelsendoj en Moëlan kaj Gourin.

La urbestro, kvankam jam de 2 jaroj li salutas min en Esperanto, disponigis nur 4 ĉambrojn por mia unua festivalo. Estis neniu reklamo (la municipa gazeto estis nuligita pro la balotoj) kaj neeblo mastrumi la vilaĝan retpaĝaron, kaj multege da gazetartikoloj en Ouest-France kaj Le Télégramme, kaj en redaktorejoj de Kemperleo, Pontivio kaj Loriento. Vidu <https://www.facebook.com/LINGVOFESTIVALO/>

Mi individue preparis homojn por prezenti 60 lingvojn kaj fine okazis prezentoj de preskaŭ 50 en unu tago en mia vilaĝo Kerjeno/Querrien. Mirinde. La lokaj instruistoj kaj infanoj de la vilaĝa publika bazlernejo estis ravitaj.

Plej malfacile estis pri la bretona, ĉar la oficiala bretona ne estas la dialekto parolata en mia regiono. Homoj ne kapablis legi la infanalbumojn, kiujn pruntedonis la biblioteko por disponigi sur tablo.

Mi ne trovis instruanton por signolingvo. Sed mi fine trovis doktoron pri la bretona por instrui la galoan lingvon!

FESTIVAL DES LANGUES, QUERRIEN, 14/02/2020



En unu tuta tago okazis fulmkursoj de preskaŭ 50 denaskaj lingvoj.

Mia filino Marĵolen/Marjolaine, kiu tiam instruis en inĝenieria altlernejo en Bresto prezentis Esperanton (ŝi ja estas denaska parolanto). Homoj miris, ke la infanoj jam kapablis krei frazojn.

Estis aktivaj tabloludoj en Esperanto kaj en la bretona, kaj kaligrafio en pluraj ekzotikaj lingvoj.

En tiu tago de sankta Valentino, la infanoj skribis "Mi amas vin" en dekoj da lingvoj kaj tio estigis ekspozicion kiu ornamis la urbodomon kaj poste la bibliotekon.

Memorindas la tre belaj folkloraj kostumoj, la kantadoj kaj dancadoj kaj la bongustaj ekzotikaj manĝaĵoj. Estus tro longe por rakonti, sed eblas spekti ĉi tie: <https://urlz.fr/cISI>

Mi estis ravita de la diligento de multaj eksterlandanoj, kiuj volonte kaj senpage prezentis sian lingvon per/el sia tuta koro.



Fransoaz' rakontas

Ĉar François Lo Jacomo prelegis ankaŭ en Ar Faüedo / Le Faouët (Morbihano) mi sukcesis havi intervjuojn kaj artikolojn pri Esperanto ankaŭ en tiu departemento.

Ĉar tuj post la tuta longa tago de la Lingvo-Festivalo okazadis prelegoj de 2 doktoroj prelegantoj.

Jacques Lescoat, doktoro pri geografio, prelegis en Kemperleo/Quimperlé pri geopolitiko de la ĉefaj mondaj lingvoj kaj François Lo Jacomo, doktoro pri lingvistiko (cetera pri Esperanto), prelegis en Ar Faüedo/Le Faouët kaj en Kemperleo/Quimperlé pri Esperanto kaj la eŭropa lingvopolitiko.

Estis pli da gazetartikoloj ol da homoj en la publiko, pro la aĉa ŝtormo kaj posta inundo.

Pri la financado: Mi mem elspesis benzinon por veturi kaj rendevui kun ĉiuj intervenantaj denaskuloj, mi elspesis por papero kaj inko de mia printilo por la afiŝoj kaj afiŝetoj dum kelkaj monatoj, kaj mi elspesis por plenigi la fri-dujon por bone akcepti ĉiujn volontajn instruantojn dum la longa tago de la 14a de februaro. Mi petis nenium repaĝon kaj neniu ĝin proponis.

Post la evento necesis pliaj du semajnoj da laboro por kolekti, ordigi kaj dissendi la fotojn al ĉiuj, kiuj krome ricevis orumitan diplomon kun rubando. Necesis aĉeti en diversaj lokoj la ĵurnalartikolojn kaj ilin plusendi al la du eminentaj prelegantoj.

Post tio venis propono organizi venontan Festivalon pri Denaskaj Lingvoj en pli granda loko, en Loriento, sed mi nenion promesis ĉar tiu ideo ne tre plaĉas al mi.

RETKUNVENOJ "INTERNACIA BABILADO"

en ni, subite en kvaranteno, kun surpriza perspektivo al drastaj sanĝiĝoj de niaj vivkutimoj. Neniu kontrakto por dancigi en baloj, neniu plano de vojaĝo eksterlanden eĉ enlande. Populariĝo de larĝaj retkunsidoj, retkunvenoj, perretaj babilrondoj... per Ĵitsi Meet, Skype, Zoom, Messenger, Discord; 8x8...

Do jen la momento por inviti vin al miaj "Internaciaj Babiladoj", kiuj okazas dufoje semajne: lunde matene (kun azianoj) kaj ĵaŭde vespere (kun amerikanoj).

(Mi ne plu uzadas Ĵitsi pro nesufiĉa klara sono kiam estas granda nombro da partoprenantoj.) Averaĝe partoprenas 22 esperantistoj el 13 landoj.

Ĉiun lundon de la 9a ĝis la 11a horo matene (UTC+2 Parizo)

Ĉiun ĵaŭdon de la 6a ĝis la 8a horo posttagmeze (UTC+2 Parizo)

<https://us04web.zoom.us/j/179517195>

Ne hezitu inviti viajn gelernantojn al mia retkunveno!

Montru surprizon! BONVENON!

Jen la retligo al Eventa Servo, kie troveblas multaj enretaj kunvenoj:

<https://eventaservo.org/Reta>

Jen invito al mia Fejsbuka evento: <https://urlz.fr/cITs>

RETKONCERTOJ KAJ RETAJ SPEKTAKLOJ

Kiel kutime, de 2013, la koncerto "Violono de la mondo" pretas, ĝi adaptiĝis al retaj komunikiloj, tiel ke vendredon la 17-an de Aprilo, en la 7-a irana kongreso okazis du retkoncertoj sub la formo de geografia kvizo.

Kaj jen nova paĝo al mia blogo, bonvolu via klubo inviti min por ret-rakontado:

<https://violonodelamondo.wordpress.com/amfabelo-por-infanoj-amfabelo-de-la-heimrestado/>

Françoise NOIREAU Esperanto kaj popolviolono [02 98 09 42 72](tel:0298094272)

violonsourire@gmail.com pri muziko

desirdapprendre@gmail.com pri Esperanto (kreado de tabloludoj)

29310 Querrien

France

[+33 609 120 374](tel:+33609120374) WhatsApp UTC+2

El niaj kluboj

En la **franca**, **SAMA VORTO**, nome "**AVOCAT**" indikas **ĉu FRUKTO**, **ĉu LEĜISTO**...
Kiel povas esti tia "**ŝajne**" **misuzo** de tiu vorto?... **estas, ja, nenia rilato inter tiuj du temoj!**
 Karaj gesamideanoj tuj trankviliĝu, en nia kara lingvo **ESPERANTO**, ne estas tiel...
 ni, ja, disponas pri du diversaj vortoj... unu por la frukto kaj unu por la leĝisto/defendanto... **UF!!!**



AVOKADO

Tiu frukto importata el Ĉilio, Izraelo aŭ Kanariaj Insuloj, estas verda aŭ bruna, eĉ nigra, tamen ĉiufoje bongusta.

Vidu, ekzemple ankaŭ en la germana ekzistas du vortoj:

- der **Rechtsanwalt** / Advokat (*lasta vorto estas el la ĝermana*) sed ambaŭ por leĝisto – defendanto;
- die **Avocat** por frukto

advokat / avocat, pli malpli sama vorto, ĉu ne?...

Bonvolu rimarki, en Latino **advocatus**, "*tiu, kiu estis vokita por asisti iun en justico, aŭ io tia...*"


(hispane) **abogado** - la defendanto / **aguacate** – la frukto "nenia rilato kun akvo".

Sed, ĉar la frukto originas el Ameriko, ni rigardu al tiu direkto – Hispanio multe agadis sur tiu kontinento, ĉu ne?... Ekzemple en Meksikio en azteka gento estas iu lingvo, nome la Knaŭat, (*ne certas pri la ortografio*) - kiu nomas nian konatan avokadon per la vorto "**Ahuacatl**" = avocat - avokado.

Kompreneble ni, ĉiuj, scias kiel ne nur bongustas tiu frukto, plie ĝi estas ege riĉa por nia korpo, vidu la apudan bildon :

Plie, iuj asertas, ke la frukto estas afrodisia...

Tamen karaj geamikoj, mi devas humile konfesi al vi... Tiu genta vorto havas duan signifon, supozeble pro ia eta simila formo, la vorto "**Ahuacatl**" sinoni- ➔ ➔ ➔ mas... "**testiko**".



Ĉar ĉi tiu teksto fontas el televid-elsendo tute hazarde spektita, mi invitas vin viziti la suban ret-ligilon:

<https://www.arte.tv/fr/videos/091140-012-A/karambolage/>

Agrablan legadon kaj plej bonajn bondezirojn al ĉiuj el vi.

*Teksto laŭ elsendo kaj klarigoj de ARTE.fr/karambolage /
 Fotoj el la reto - tradukis Jys*

Akcelilo por multlingveco

GRAVA NOVAĴO

La projekto “Akcelilo por multlingveco” finiĝis kaj instrumaterialoj disponeblas en <https://lernu.net/eo/instruado> (en marto 2020 en 9 lingvoj, krom la angla kaj esperanto)

Ellaborita de instruistoj el 7 eŭropaj landoj kaj du Universitatoj (Ostende en Danio kaj Maribor en Slovenio), ĝi celas klasojn de 9-jaraĝuloj ĝis 15, do en Francio por CM1/CM2 kaj collège, jara instruado 2 horojn/semajne (aŭ 1 horon/semajne dum du jaroj), entute 64 horojn.

En Francio, uzado en CM1/CM2 kongruas kun la celo de la projekto "Akceli lernadon de fremdaj lingvoj", tiel ke poste en "collège", la lernejoj pli rapide lernos fremdajn lingvojn, interalie la anglan, kiun ĉiuj volas/devas lerni!

La kurso uzeblas de ne-esperantistaj instruistoj.

Do, por instruistoj en bazlernejoj kiuj devas instrui fremdan lingvon kiun ili ne bone regas, ĝi povus esti solvo por instruado dum la deviga lerno-tempo.

Kaj ĉar la projekto estis parte financata de EU ĝi estas iom oficiala!

Nun necesas trovi instruistojn kaj lernejojn...

La materialo ankaŭ uzeblas en "collège", sed verŝajne okaze de aliaj cirkonstancoj.

Laŭ artikoloj de Didier Janot kaj Gilles Tabart

Le projet “Accélérateur de multilinguisme” est terminé et le matériel d’enseignement est disponible dans <https://lernu.net/eo/instruado> (en mars 2020 en 9 langues, en plus de l’anglais et de l’espéranto). Elaboré par des enseignants de 7 pays européens et deux Universités (Ostende au Danemark et Maribor en Slovénie), il est destiné aux élèves de 9 à 15 ans, donc en France pour CM1/CM2 et collège, pour une année d’enseignement 2h par semaine (ou 1 heure/semaine pendant 2 ans), en tout 64 heures. En France, l’usage en CM1/CM2 coïncide avec le projet « Accélérer l’apprentissage des langues étrangères », dont le but est que par la suite au collège les élèves puissent apprendre plus rapidement les langues étrangères, notamment l’anglais, que tous veulent apprendre !

Le cours est utilisable par des enseignants non espérantophones

Donc, pour des enseignants de primaire qui doivent enseigner une langue étrangère qu’ils ne possèdent pas bien, ce pourrait être une solution pour un enseignement pendant le temps d’apprentissage obligatoire.

Et étant donné que le projet a été financé en partie par l’Union Européenne, il est un peu officiel !

Il est maintenant nécessaire de trouver des enseignants et des écoles...

Le matériel est utilisable aussi au collège, mais sans doute dans un autre contexte.

Selon des articles de Didier Janot et Gilles Tabart

Akcelilo por multlingveco

Akcelilo por multlingveco” estas instruplano, kiu ebligas al infanoj pli rapide lerni fremdajn lingvojn kaj memfidiĝi pri sia kapablo de lingvolernado. Ĝi baziĝas je la propedeutika ideo, ke lerni modellingvon, en nia kazo bazan Esperanton reduktitan al la plej ofte uzataj 300 morfemoj, povas plibonigi lingvolernajn kapablojn de infanoj. Pluraj studoj montris, ke unujara lernado de la modellingvo Esperanto ĝis 30% plirapidigas postan lernadon de aliaj lingvoj. La kialo estas, ke la modellingvo estas tre facila, ne havas esceptojn kaj funkcias kiel logika konstrumodelo. Ĝi ebligas al infanoj kompreni fundamentajn lingvajn principojn pere de malkonstruado kaj rekonstruado de vortoj kaj frazoj. Ĝi estas multe pli efika ol aliaj lingvoj por instigi lernantojn lerni pro la eblo de la komenco mem konstrui proprajn frazojn.

Per tiu ĉi kurso infanoj lude lernas minimumon de analiza lingvo, kiu donas al ili klaran ideon pri tio kiel lingvoj funkcias. Infanoj komprenas tipojn de vortoj, terminojn kiel pluralon, la bazajn du kazojn (nominativon kaj akuzativon), la manieron krei frazojn kaj ili akiras la kapablon krei multajn novajn vortojn el bazaj radikoj kaj afiksoj kiujn ĉiu lingvo ofertas. Tio komprenigas al infanoj la strukturon de lingvoj ĝenerale kaj donas al ili la tiel nomatajn meta-lingvajn sciojn.

Ĉiuj materialoj estas ellaboritaj por uzado fare de lingvoinstruistoj, kiuj ne lernis Esperanton antaŭe. La materialoj enhavas gramatikajn sekciojn kaj detalajn gvidliniojn por helpi instruistojn prepariĝi por enklasaj studhoroj.

La materialoj estis ellaboritaj kadre de projekto kiu estis kunfinancita de la programo Erasmus+ de la Eŭropa Komisiono.

« L'accélérateur de multilinguisme » est un plan de cours qui permet aux enfants d'apprendre les langues étrangères plus rapidement et d'avoir confiance en leurs capacités à apprendre des langues. Il se base sur l'idée propédeutique qu'apprendre une langue modèle, en l'occurrence un espéranto basique réduit aux 300 morphèmes les plus utilisés, peut améliorer les capacités des enfants à apprendre les langues. La raison est que la langue modèle est très facile, n'a pas d'exceptions et fonctionne comme un modèle de construction logique. Elle permet aux enfants de comprendre des principes linguistiques fondamentaux en décomposant et recomposant des mots et des phrases. Elle est plus efficace que les autres langues pour encourager les élèves à apprendre grâce à la possibilité de construire soi-même ses propres phrases dès le début. Grâce à ce cours, les enfants apprennent de manière ludique les bases d'une langue analytique, ce qui leur donne une idée claire du fonctionnement des langues. Les enfants comprennent la nature des mots, des termes tels que « pluriel », les deux cas essentiels (nominatif et accusatif) et la manière de former des phrases, et ils acquièrent la capacité à créer de nombreux nouveaux mots à partir de racines de base et d'affixes que l'on trouve dans toutes les langues. Cela permet aux enfants de comprendre la structure des langues en général et leur donne ce qu'on appelle des connaissances métalinguistiques. Toutes les ressources ont été élaborées pour être utilisées par des professeurs de langues qui n'ont pas préalablement appris l'espéranto. Elles contiennent des sections sur la grammaire et des instructions détaillées pour aider les enseignants à se préparer pour les heures de cours. Les ressources ont été élaborées dans le cadre d'un projet cofinancé par le programme Erasmus+ de la Commission européenne.

Pasko



Pasko

Nia vorto Pasko devenas de la juda **Pesach**, kiu signifas preterpasi, memoro de la eliro de la judoj el Egiptio. Oni devis ”preterpasi” rapide ĉar ne estis tempo atendi ke la pano estis fermentita. Nefermentitan panon oni nomis **maco**.

La latina nomo de pasko estas **paschae**. En francparolantaj landoj oni ofte donis varianton de tiu vorto – **Pascal** – al knaboj, naskitaj dum pasko.

En la **rus-ortodoksa tradicio** oni celebras **noktmezan meson**. Unue la preĝejo estas tute malhela, sed kiam la horloĝo montras la 12an, la pastro eklumigas kandelon. Poste la preĝeja komunumo sekvas lin kaj en vico eklumigas kandelojn. Kiam ĉiuj havas kandelojn oni staras en rondo brakumante unu la alian memore al la releviĝo de Kristo.

Svedaj tradicioj:

Kial paskaj sorĉistinoj? Estas ligilo al la procesoj kontraŭ sorĉistinoj en la 17a jarcento. La Diabolo invitis sorĉistinojn al Blåkulla. Laŭ popola tradicio dum Sankta Ĵaŭdo kiam Kristo estis kondamnita, ĉiuj malbonaj fortoj estis liberaj. Oni ekbruligis fajron kaj pafis al la imagitaj sorĉistinoj.

Kial paska vergaĵo? Laŭ la popola tradicio oni vipis unu la alian dum la Sankta Vendredo por memorigi pri la sufero de Kristo.

Kial la paska virkoko? Kristo antaŭdiris ke trifoje antaŭ la matena kokeriko Petro malkonfesos lin.

Kial paskaj leporoj? Leporoj estis simbolo de fekundeco dum pagana printempa celebraz. Dum kristana tempo la paska leporo unue aperis en Germanio dum la 17a jarcento. Elmigrintaj germanoj kunportis la tradicion al Usono. Nur komence de la 20a jarcento la paska leporo venis al Danio kaj poste al tuta Skandinavio.

Kial kiom da ovoj? Dum la 40-taga fasto oni ne devis manĝi ovojn. Do, estis amaso da ovoj je pasko kaj oni havis ovo-feston.

Fonto: Lokalpressen i Lerum 5 april 2020 /Siv

El la « Ora Ĵurnalo »

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo, Svedio

Redaktoroj estas Siv Burell kaj Ingegerd Granat

La trovita kato



Alicia, trovita kato

venis al ni en Gråbo la 28an de novembro en 2008.

Mortis la 1an de aprilo en 2019. Tiam ĝi povus esti 17-jara Persa kato en kombino kun brita mallonghara kato. Ni certe ne havis ideon aĉeti katon, sed hazarde ni ekhavismirindan nigran katon, Alicia. Dum tri monatoj homoj en Landvetter vidis mal-

dikan katon, kiu serĉis nutraĵon. Ŝi timis homojn kaj preferis kaŝi sin en arbaro.

Ĝi verŝajne estis al kutimigita manĝi nur industri-faritan nutraĵon kaj ne kapablis kapti bestetojn.

Malsato igis ĝin en la proksimecon de homoj kaj iu bonulo sukcesis kapti ĝin, meti ĝin en kaĝon kaj lasi ĝin en kathotelon. La katino portis kolbendon kun metala guto, sed sen nomo kaj adreso de la posedanto. Oni nomis ĝin Alice.

Post kelkaj semajnoj la pezo de Alicia estis bona kaj oni vendis ĝin interrete. Kursano de mi aĉetis ĝin, sed post nur kelkaj semajnoj ŝi malsaniĝis kaj petis min zorgi pri la kato.

Kiam la taksio venis por veturigi ŝin al hospitalo mia edzo kaj mi staris en ŝia domo kun ŝlosilo, kaĝo, katsablo, katnutraĵo – kaj gantoj. Alice certe ungratos vin, mia kursano diris.

Do, ni estis pretaj kapti la katon. Ni serĉis, sed ne trovis ĝin nek en la baza etaĝo, nek en la unua. – Alice certe kuris eksteren kiam la taksi-ŝoforo malfermis la pordon, mia edzo diris. Ni serĉis en la ĝardeno, ni serĉis en la ĉirkaŭaĵo kun katbombono en la manoj. Estis nokto, la stratlampoj lumigis parton de la ĉirkaŭaĵo. Jes, fakte estis nigra kato sur pado, kato, kiu ŝajne ne timis nin. Sed ĉu ĝi estas Alice? Jes!

Ne! Jes! Ne! Ĉu Alice havas blankajn piedojn? Ne, eble ne. Ni revenis al la domo, malfermis la pordon, kaj alte sur la ŝtuparo inter la etaĝoj staris **26**

Alice kun mieno dirante: – Mi ja estis ĉi tie la tutan tempon.

Do, Alice translokiĝis de Lerum al Gråbo. Ni

ŝanĝis la nomon al Alicia kaj ĉesis diri **ĝi**, ĉar estas ja **ŝi** – nova membro de la familio. Ĉiuj ŝatis Alician, sed ŝi ne ŝatis ĉiujn. Precipe infanojn ŝi ne ŝatis. Kiam venis infano, ŝi kaŝis sin.

Ŝi ankaŭ kaŝis sin kiam estis tempo iri al la zoo-vendejo, kie virino tondos ŝiajn ungojn. Eĉ se ŝi ne vidis la kaĝon ŝi iel sentis miajn pensojn. Okazis ke mi iris al la zoo-vendejo sen kato demandante pri nova tempomendo. Hejmenirinte mi tamen renkontis ŝin atendente en la vestiblo kiel kutime.

Tempo pasis. Ŝi fariĝis pli kuraĝa kaj ofte atentigis nin, kiam venis homoj. Se venis gasto kun hundo, ŝi sidiĝis en alta loko spektante la hundon.

Ĉiun vesperon ŝi miaŭis "Bonan nokton!" kaj kuŝis kelke da tempo en mia lito. Ĉiun matenon ŝi miaŭis: "Estas tempo por matenmanĝo!"



Alicia maljuniĝis. Ŝi ne facile plu povis salti. Sekvis vizitoj al veterinaro. Ŝia artrozo malhelpis ŝin sidi en siaj altaj preferataj lokoj. Eĉ iri en la ŝtuparo fariĝis iomete malfacile, kaj ŝi verŝajne malĝojis. Post radiografio mi kune kun la veterinaro decidis ke estas tempo por ŝi eniri la katparadizon.

La 1-an de aprilo en 2019 mi faris la lastan foton de Alicia kaj iris al la veterinaro. Oni eklumigis kandelon, donis al ŝi trankviligan injekton antaŭ la mortigan. Ankoraŭ mi reagis kiam estas iu nigra kiu moviĝas. Ankoraŭ mi tre zorgeme malfermas pordon... povus ja sidi nigra kato malantaŭe.

Domo sen kato ne estas la sama domo.

Alicia mankas al mi.

Siv

El la « Ora Ĵurnalo » kaj tio emociigis min ĉar mi enterigis unu el miaj 2 katinoj lastan semajnon, Jannick

Agendo 2020

Rencontres de la chorale
Interkant'
 à
Grésillon
 du 30 avril au 4 mai annulées
 Mais participez à celle
 du 20 au 25 octobre
 avec concert le 23 octobre



Bonvenon en la kulturdomo Kastelo Gresillon

Pluezekaj renkontoj
15-a – 21-a de aŭgusto
Vidu
<http://plouezec.armor-esperanto.fr/>

La 105-a Universala Kongreso de Esperanto

Montrealo



01– 08 aŭgusto 2020 ne okazos
sed okazos en 2022

KIO OKAZOS EN 2020 TAMEN!

2-a BEMI-Semajno : 6-a – 14-a de junio

Por bicikli ĉirkaŭ Gresillon

vidu <https://bemi.tejo.org/semajno/>

06-16/07 [Maratona Esperanto-kurso](#)
dum 10 tagoj kun *Ilona Koutny, JLK ...*

06-16/07 [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj faroj
(franclingve)

13–17/07 [Internacia E-Konferenco](#) post
OSIEK « Naturo, Medio, Klimato, Scienco »

20–24/07 [Verda Naturisma Semajno](#) (kun
E-kurso) organizata de Greziljono

10-a – 17-a de aŭgusto [FESTO](#)revenas

mojosa muzika renkontiĝo
kunorganizita de Verdaj Skoltoj
kaj vinilkosmo

17 -27/08 10-a [Festa Semajno](#) por infanoj
kaj familioj kun *Nicky, Jean-Luc, Larisa...*

20 - 25 korusa renkonto de *Interkant*
kun *Zdravka Bojĉeva*

25/10–01/11 9-a [AŬTUNE](#) la Esperanto-
ferioj - kun halovena festo. Esperanto-kursoj
kun *Stefan MacGill, Bert Schumann*